


(Nova Serio)

Redakcio-Administracio:
BOX 731F, ELIZABETH-STR.: P.O., MELBOURNE (AŬSTRALIO).
Abono (por 10 numeroj):
Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj—Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.
Redaktisto: REGINALD BANHAM, F.B.E.A.
Specimena numero—unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.
Unu numero: 4 pencoj. :: :: :: :: :: Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.
Ce ĉiuj poŝtmandatoj kaj -monbiletoj igu S-ron Roy Rawson la pagato.

N-ro 149 (13th Year) MELBOURNE (AŬSTRALIO). 23 FEBRUARO, 1933.

## "Dr. ESPERANTO."

### The Man and His Work.

(concluded)

Here a word about the material used for the vocabulary. Earlier, when he was searching for and casting out from the grammar all unnecessary speech-forms, he was guided by the principle of economy for the vocabulary also, and, in the belief that it is immaterial what form a word shall have, if it is agreed that it expresses a given idea, he simply "invented" words, striving to make them as short as possible. For instance, he believed that instead of the 12-letter word for "conversation" the 2-letter "pa" could be used to express the same idea. He therefore simply wrote a mathematical series of short but easily pronouncable combinations of letters, giving to each of them the signification of a defined word, such as:—a, ab, ac, ad, . . . . ba, ca, da, . . . aba, aca, ada, and so on. This scheme, however, he soon abandoned, for in practiçe it was found that the words were learned only with great difficulty. It was then that he became convinced that the material for the vocabulary would have to be founded on a Romanic-Teutonic base, from already existing words changed only as much as regularity and other considerations of language made necessary. Having reached this point he made use of the fact that modern languages possess a huge provision of words already "international," that is, words known to most European peoples, and which formed a ready treasury for a future world-tongue.

In 1878 the artificial language seemed to him almost ready, although between the "Lingwe Uniwersala" of that day and the Esperanto published nine years later there exists a great difference. He confided to his fellow-students, and the majority of them, attracted by the idea in general and the extraordinary simplicity of Zamenhof's language in particular, began to learn it. On 5th December, 1878, they gathered to celebrate the birth of the new tongue, making speeches in it and enthusiastically singing a hymn composed for the occasion.

With the passing of half a year from the day of that celebration Zamenhof and his colleagues finished their gymnasium course and parted. Zamenhof's young apostles at first tried hesitatingly to propagate the new language, but on the lads meeting the laughter of full-grown men their advocacy turned to denial, and the author alone remained faithful to his idea. Seeing before him, however, only mockery and actual hindrance, he decided to hide the scheme away from all; and so, for five years and a half of his university life, he never spoke of his life's aim. It was for him a very difficult period. The secrecy tormented him: forced continually to conceal his thoughts and plans, he attended scarcely any function, and took part in none of the university's social activities, and so the most happy time of the average youth's life, that of his student days, passed for him in sadness. On a rare occasion, having ventured to seek mental repose in society, he would feel himself to be a stranger and would go to his quarters, there to ease his heart in composing verses in the tongue he so carefully fashioned. One of these poems, Mia Penso, was inserted in the first brochure published by him; but to its readers, who were unaware of the circumstances in which it was written, it must have seemed strange and incomprehensible.

For six years he worked privately, perfecting and testing the language,—and he had much to do, although in 1878 it had seemed ripe for publication. He translated much, wrote original pieces, and lengthy trials convinced him that to what had seemed quite sound in theory there was in practice still something lacking. Much he had to trim, displace, correct, and even radically transform. Words and forms, principles and requirements, jostled and hindered one another, although in theory and taken separately, and in short trials, they had seemed quite effective. Such elements as the indefinite preposition "je," the "elastic" verb "meti," the neutral but clearly defined ending "au" and so on would never have entered the head of a mere theorist. Some forms that had seemed to him riches were revealed in practice as useless ballast, and so several unwanted suffixes were cast out. In 1878 it had seemed to him that it was sufficient for a language that it have a grammar and a vocabulary—the crudity, the ungracefulness of his language as it was then constituted he ascribed to his not knowing it sufficiently well himself: but practice ever tended to convince him that the tongue still

needed an elusive "something," a binding element which would give to it life and a definite, fully formed spirit.

He then began to avoid literal translations from this or that language, and to strive to think and write directly in the neutral tongue. Then came the day when he became aware that the language in his hands had ceased to be a mere unsubstantial shadow of the language from which he was translating at the time: it had acquired a spirit and being of its own, and, as it were, a well-marked physiognomy. Speech in it from henceforth flowed of its own accord, gracefully, quite freely, even as the living mother tongues of men.

Still one circumstance caused him to postpone the presentation of his language to the public. There had remained unsolved one problem, which had tremendous significance for the neutral tongue. Zamenhof knew that people would say to him:—"Your language will be useful to us only when the whole world shall see fit to adopt it; therefore we will adopt it when the whole world does the same." But as the world of men consists of its separate units, he saw that the neutral tongue could not have a satisfactory future until any person could, without consideration of the world's attitude, utilise it for his own purposes.

This problem was considered by Zamenhof at great length, and finally the so-called secret alphabets, long in use, which had not needed to wait for the world's acceptance of them before they were of use, and which when enclosed in a letter gave to the wholly uninformed addressee the possibility of understanding all written to him, led Zamenhof to the same thought—that of arranging his language in the same way. So he drew up "keys," which contained the sixteen-rule grammar and the whole vocabulary in the form of separate, wholly independent and alphabetically ordered elements. This made it possible for the uninformed addressee of any nationality to read a communication so written.

Having finished his university course and begun a medical career, Zamenhof now considered the practicability of publishing his work. Having prepared the manuscript under the title of "Dr. Esperanto, an International Language: Foreword and Complete Textbook," he looked for a publisher. But here he met the bitter reality of that financial stress from which he was henceforth to suffer so severely. For two years he vainly searched for someone willing to risk publication, and when at last he received such a promise he was called on to experience the bitter disappointment of seeing, after six months' procrastination, his brochure finally rejected. At last, however, with the financial aid of his father-in-law, the booklet was given to the world by the author himself in 1887. On the eve of the event Zamenhof was inwardly burning with excitement. He knew that from the day that was to see the emergence of the loved work there could be no going back. He knew the fate that awaited the doctor dependent on his practice if the public should see in him a dreamer, or one occupied with "fads." He knew that he was about to risk the future happiness of mind, and even means of livelihood, not only of himself, but of his family; but he could not abandon that which he looked on as the chief end of his life—that which had entered into his very blood—and so he crossed the Rubicon.

---

## LA EDZINO DE LA BRUTARPELISTO.
### (daurigata)

"Aligatoro" sin sternas sur la planko; liaj okuloj estas direktataj al la intermureto. Per ĉio-tio, ŝi scias ke la serpento estas tie. Estas larĝaj fendoj en tiu muro, malfermiĝantaj sub la planko de la domo.

Ŝi ne estas timulino, sed antaŭnelongaj okazintaĵoj estas iom ĝenintaj ŝiajn nervojn. Malgranda filo de ŝia bofrato ĵus estis mordita de serpento, kaj mortis. Krom tio, ŝi ne aŭdis de sia edzo depost ses monatoj, kaj estas iom maltrankvila pri li.

Li estis brutarpelisto, kaj komencis la ŝafbredadon ĉi-tie, kiam ili edziĝis. La pluvmanko de 18— ruinigis lin. Li devis vendi marĉande la restaĵon de sia ŝafaro, kaj ree iĝi pelisto. Li intencas movi sian familion en la plej apudan urbon, kiam li revenos, kaj interdume, lia frato, kiu mastrumadas kamparan drinkejon sur la ĉefvojo, vizitas ŝin ĉiumonate, kun provizaĵoj. La edzino ankoraŭ havas du bovinojn, unu ĉevalon, kaj kelkajn ŝafojn. La bofrato kelkafoje mortigas unu el tiuj, donas al ŝi tiom kiom ŝi bezonas, kaj prenas la restaĵon page por aliaj provizaĵoj.

Ŝi estas kutimiĝinta al la soleco. Iam ŝi vivis laŭ ĉi-tiu maniero dum dekok monatoj. Kiel knabino, ŝi konstruis la kutimajn kastelojn en la aero; sed ĉiuj ŝiaj knabinaj esperoj kaj aspiroj jam de longe mortis. Ŝi trovas ĉiun eksciton kaj distradon kiun ŝi bezonas en la paĝoj de la "Ĵurnalo por Junaj Fraŭlinoj" kaj—Dio ŝin helpu!—trovas plezuron, trarigardante la bildojn de la novaj vestmodoj.

Ŝia edzo estas Aŭstraliano, kiel ankaŭ ŝi. Li estas neŝparema, sed sufiĉe bona edzo. Se li havus la monrimedojn, li kondukus ŝin al la ĉefurbo, kaj loĝigus ŝin tie, kiel princino. Ili jam kutimiĝis al la disiĝo, aŭ pliĝuste, ŝi kutimiĝis. "Ne utilas plendadi," ŝi diras. Eble li foje forgesas ke li estas edzo; sed se li havas bonan ĉekon kiam li revenos, li donos al ŝi la plejmulton. Kiam li havis monon, li prenis ŝin al la ĉefurbo kelkafoje—luprenis dormvagonon por la vojaĝo, kaj gastis ĉe la plej bonaj hoteloj. Li ankaŭ aĉetis por ŝi veturilon, sed ili devis oferi ĝin, kune kun la aliaj posedaĵoj.

La lastaj du infanoj naskiĝis en la sovaĝejo—unu, dum ŝia edzo estis alportinta ebrian kuraciston, perforte, por akuŝigi ŝin. Ŝi estis sola ĉi-tiun fojon, kaj tre malforta.—Ŝi estis malsaniĝinta pro febro.—Ŝi preĝis al Dio, ke Li sendu helpon al ŝi. Dio sendis Nigran Marion—la plej nobla nigrulino en la tuta lando. Aŭ pliĝuste, Dio unue sendis Jimmy, kaj li sendis Nigran Marion. Lia nigra vizaĝo aperis en la pordejo, li komprenis la situacion je unu ekrigardo, kaj diris kuraĝige "Bone, sinjorino—mi alportos mian maljunulinon (edzinon)—ŝi estas ĉe la rivereto."

Unu el ŝiaj infanoj mortis dum ŝi estis ĉi-tie sola. Ŝi rajdis deknau mejlojn por helpo, portante la mortintan infanon.

Certe nun estas la unua aŭ dua horo. La fajro preskaŭ forbrulas. "Aligatoro" kuŝas kun la kapo restanta sur la piedegojn kaj observas la muron. Li ne estas tre belaspekta hundo, kaj la lumo elmontras multajn malnovajn cikatrojn, kie la haroj ne povas kreski. Li timas nenion sur aŭ sub la tero. Li atakos virbovon tiel volonte kiel li atakos pulon. Li malamas ĉiujn aliajn hundojn—krom kanguru-hundoj—kaj montras evidentan malŝaton al amikoj aŭ parencoj de la familio. Ili malofte venas, tamen. Foje li amikiĝas kun fremduloj. Li malamegas serpentojn, kaj jam mortigis multajn, sed iun tagon li estos mordita kaj mortos; la plejmulto da serpent-hundoj finiĝas tiamaniere.

---

### FIANĈIĜO.

S-ro A. W. Peacock, Loka oficisto de la Savada Armeo, Prezidanto de la Sidneja Esperanto-Societo, kaj Ĉefinstruisto de la Petersham-a Filio de tiu Societo, fianĉiĝis kun f-ino Emmo Ashman, ankaŭ de la Savada Armeo, kaj studantino de la lingvo Esperanto, loĝanta en Lambton (Novkastelo, Nova Sud-Kimrujo).

La geedziĝo okazos en la Preĝejo de la Savada Armeo en la suburbo Lambton, la 29an de Aprilo 1933a, je la 3a

akurate.

Iuj gesamideanoj, kiuj eble estos en Novkastelo je tiu dato, estos kore bonvenaj al la ceremonio, eĉ se mankus al ili invitletero. (Nur estos necese, ke oni menciu la vorton "Esperanto" al la pordisto.)

## Recenz (et) oj.

**LA OKULOJ DE LA ETERNA FRATO:** de Stefan Zweig. tradukita de Helene Wolffe, eldonita de Heroldo de Esperanto. Pĝ. 65, prezo 18p.

Leginte en la lasta tempo certajn el niaj siatempe laŭdataj originaloj, mi sidiĝis por absorbi kion Stefan Zweig, la fame konata germana aŭtoro, jus verkis por la pensemula mondo. Post la strečado de pacienco necesa por trastumbli la kompatindan banalecon kiu ankoraŭ tro markas nian netradukan literaturon, mi sentis ravan altiĝon de la spirito sekvante en unu vespero ĝis finpaĝo ĉi tiun frapantan historion pri la baraktado de la konscienca raĝputo, Virata, ĝis plej pura etiko.

La verko radias moralan inspiron. Ĝi taŭgus kiel temo por tiuj kristanaj pastroj kiuj en siaj predikoj speciale ŝatas pritrakti literaturajn verkoin el certa speco. Virata, fama svinganto de l'glavo, servante sian reĝon en milito, nescie mortigas sian fraton, kies mortecaj okuloj de tiam konstante reaperadas en la vizaĝoj de aliaj homoj, liaj fratoj en Dio. Li strebas akiri al si sintenon al Dio kaj la homoj, kio estu en harmonio kun lia ĉiam vastiĝanta koncepto de la Dia volo kaj la homa devo. Li rezignas la glavon, prenas la mantelon de l'juĝado. Sed post plua revelacio li formetas tiun kiel nekongruan kaj fariĝas paca konsilanto; sed ankaŭ tion kaj eĉ vivadon inter homoj li devas forlasi, por ermitiĝi en arbara denso. "Nur tiu, kiu vivas sola, vivas por sia Dio." Li kredas ke nur en plena neago kaj ekster ĉia homa rilato li povas vivi senkulpa. Sed venas stranga klimakso, ke Virata, per la eternaj okuloj lumantaj el virina vizago, lernas ankorau ke ankaŭ la neagulo, malgraŭ neintenco, povas dolorigi la homfratojn, kaj ke eĉ la "neagado estas agado" por bono aŭ malbono. Lia vivfino estas tragedia.

Bona traduko. Nur ĝenas ia tipe germana penspezeco ĉe frazoj kiaj "sendezire ŝvelanta super la sajnon de la ŝajno": "ripozanta en feliĉega senkonscio de la esenco." 11, "jaspaj" (jaspisaj); 31, "Tion (Tio), kion li travivis." "Ĝis kiam" (anstataŭ simple "ĝis") estas senutila pleonasmo. La zamenhofa uzado de "ĝis kiam" havas specialan signifon.

---

**Systematisk kurs i Esp-o,** de Seppik kaj Malmgren. 88 pagoj, prezo 1 ŝ. Por svedoj sendube utila gramatiketo de nia lingvo. La anekdotoj kaj konformaj demandoj interescele elektitaj tre taŭgigas ĝin por la ekzamenisto ĉe parolaj testoj. Tiu, kiu kutimas diri ke Esp-o estas strangaspekta lingvo, sciu ke "otvivelaktigt" signifas "evidente."

---

**Dialogoj en Esp-o,** de Einar Dahl, por progresintoj kurse kaj grupkunvene. Nia sveda aktivulo substrekas antaŭparole la neceson paroli, paroli kaj paroli Esp-on, kaj per ĉi-dialogaro tre instigas onin tion fari. Jen ekzemplo de lia originalstila frazfaro: "la elparolado estis tiel kriplìgita ke mi sidis kiel demanda signo." Paĝo 6, "ĉiuj geniuloj trovis ke mondolingvo devas havi . . . malgrandan vortaron." Se Esp-o ja venkos, la estontaj socihistoriistoj devos iom modifi tiun aserton. Prezo, du resp. Kuponoj, per "La S.K."

**"Esperanto Lehrbuch"** (laŭ gramatika metodo), eld. de Arbeiter Esperanto-Bund, Dircksenstr. 42, Berlin C25. Prezo 1 rm. 96 pp.

Bone presita, plejparte fidinda lernilo, destinita speciale por konscie proletaj germanlingvanoj. La kompilinto do tiras siajn lernekzemplojn ĉefe el la frazeologio de l'revolucieco.

Unu du kritikindaĵoj: p. 50; ne skribu terurajon kia estas "milokcentsepdekunu" (mil okcent sepdek unu). (Ĉetere en la presita vorto estas literaro). 54. Uzu akuzativon post "kontraŭ" nur kiam temas pri direkto. Ekz. "Ĉi mi iru kontraŭ la Filiŝtojn". (1 Kron. 14/10), sed: "rimedo kontraŭ malsano," "kiu estas kontraŭ mi, tiu estas mia kontraŭulo." Sur p. 65 ni legas ke "-uj" por landnomoj estas jam arhaika, do ni uzu "-io," eventuale "-lando." Tio iom mirigas, sed ankoraŭ pli la fakto ke la kompilinto uzas senkomente la efektive arhaikajn formojn: pirujo, pomujo k.c. anstataŭ pirarbo, pomarbo k.c. Kial uzi la du nomojn "fabriko" (ĉu ne pliĝuste "fabrikejo"?) kaj "uzino" por tio, kio estas ŝajne la samsama afero? Ne kuŝas en la libreto ia klarigo pri diferenco inter la du formoj. La sufiksoj -end, -oz, -iv, kaj -iz estas instruataj; precipe la du lastaj estas ankoraŭ tre disputeblaj. Ni memoru la konsilon de Zamenhof: "La libroj instruaj devas esti pedante konservativaj." Devas teksti: bogepatroj — Schwiegereltern. "Legionoj" (legioj).

La verketo finiĝas per interesaj legaĵoj en Esp-o. Ĉiu sci(et)anta la germanan ĝin mendu. (Robo.)

---

### MILITREZISTADO KIEL POLITIKA FORTO.

1905. Milito inter Norvegujo kaj Svedujo estis neebligata per decidemo de junaj socialistoj rifuzantaj militservi.
1909. La hispana kolonia milito en Maroko estis finigata per ĝenerala striko.
1918. Germanaj maristoj rifuzis obei ordonojn de admiraloj kiuj, malgraŭ la armistico, volis fari finan batalon.
1919. Francaj maristoj de la militŝiparo en la Nigra Maro, rifuzis militservi en proponata atako kontraŭ la sovjetoj, tiel nuliganta la aferon.
1920. La britaj "Konsilantaroj de Agado," reprezentantaj la britan laboristan movadon, rifuzis transporti armilojn kaj municion kaj minacis ĝeneralan strikon, tiel foriganta intencatan militon kontraŭ Rusujo.
1920. La laborista movado de Supra-Silezio malebligis transporton de municio por la Poluja-Rusuja milito.
1920. La germana Kapp-revolucio, kiu celis restarigon de la monarĥeco, estis venkata de la ĝenerala striko de laboristoj kaj dungitoj.
1917-22. Danujo, Svedujo kaj Norvegujo starigis alternativan servon civilan por kreskanta nombro da junuloj kiuj rifuzis fari armitan servon aŭ ian servon apartenantan al la armeo.
1923. Holando starigis alternativan civilan servon.
1928. Belgujo starigis alternativan servon.

("La Militrezistanto," 11 Abbey-rd., Enfield, Middlesex, Eng.)

---

### PLUMA ERARO.

S-ro J. Major, de "Oomoto," Japanujo, afable rimarkigis al ni ke estas eraro en linio 5, kol. 1, sur p. 372 de La S.K. La vorto "kurso" devas esti "klaso." Bonvolu ĝustigi!

---

### PRACTICAL WORK FOR THE ESPERANTISTS.

Esperantists are for the most part internationalists, whose interest in the language springs from the desire for those international friendships and understandings which the use of Esperanto fosters. But many non-esperantists also, while not at the moment interested in the language, are wishful of exchanging views with individuals or groups in other countries. Esperantists might well enter this new field of activity by offering their knowledge of the language to promote correspondence between such individuals or groups. The esperantist's part in this work is to act as a translator for the correspondents. Such work would undoubtedly cause increased interest in Esperanto and add many active esperantists to the ranks.

To be of practical value, such efforts, of course, must be organised and not merely sporadic. Activities based on these lines have already achieved notable success in Europe, and particularly in Great Britain. Esperantists are organised for this work in the Labor Esperanto Associations (L.E.A.) of the different countries. Details of the organisational work of the British L.E.A. (B.L.E.A.) have been forwarded to many esperantists in Melbourne, and it is felt that an Australian L.E.A., on similar lines, should be formed.

All interested in this aspect of the

work of Esperantists are invited to attend a meeting in the Temperance Hall, Russell street, on Tuesday, 28th Feb., when the formation of the A.L.E.A. will be discussed, and the group provisionally constituted.

### TO OUR SUPPORTERS

Thanks for the following:—Miss C. Hannaford, 5/-, Aug., '33; Mr. L. Illingsworth, 4/6, Dec., '33; Mrs. Chapman-Taylor, 5/-, Jan., '34; Mr. N. Midthus, 5/-, Jan., '34; Mr. D. Haccou, 5/2, Oct., '33; Melbourne Esperanto Club (Sales), 6/2; Mr. A. Saar, 5/-, July, '35; Melbourne Esperanto Society (Advt.), 5/6; Melbourne Esperanto Club (Subs.), £1/18/-; Mr. C. Whittenbach, 4/6, Dec., '33; Mr. J. Eliot, 4/6, Dec., '33; Mr. C. W. Ballard, 4/6, Dec., '33; Coburg Esperanto Group (Sales), 8/8; Mr. A. H. Slade, 10/-, Sept., '34.

## Radio Column

Esperanto lessons will be broadcast from 3LO at 7.45 p.m. on the dates mentioned below. An anecdote will be read at the end of each lesson to enable students to check their pronunciation.

**March 4th.**—Anecdote:—Kial vi petas almozon?—Ĉar mi volas manĝi, mia bona sinjoro.—Kial do vi ne laboras? —Ha, kiam mi laboras, mi ankoraŭ pli volas manĝi.

**March 18th.** — Anecdote:— Sinjoro! krias unu maljuna fraŭlino el la vagono al unu sinjoro, kiu volas tien eniri; tie ĉi estas la vagono por sinjorinoj.—Ho, respondas la sinjoro, enirante kaj dismetante siajn pakaĵojn, mi ne estas timemulo.

**April 1st.**—Anecdote:— Avarulo, elirante el la preĝejo, kie la pastro parolis pri bonfarado, diris: "La prediko tiel min tuŝis, ke mi mem estas preta peti almozojn."

### AL LA SUDA KRUCO.

1/12/32.

Estimata redaktoro,

Sub la titolo "Grumbloj" ni trovis en la oktobra numero de via organo kritikan noton pri la Melburna gazetaro rilate novaĵojn pri la pariza kongreso.

Ni ne scias, al kiu estas direktita la plendo. Sed ĉar ni estas respondecaj pri la organizo de la universalaj kongresoj, la noto trovis nian atenton.

Ni do deziras diri al vi, ke aparte bone organizita gazetara servo funkciis en Parizo. Ĉiutage la grandaj agentejoj estis informitaj per aparta telegramo speciala. Se la aŭstralia gazetaro ne havas interligon de korespondado kun la koncernaj agentejoj aŭ se ĝi ne interesiĝas pri nia kongreso (kies indiferentan karakteron por Aŭstralio laŭ nesufiĉa informiteco de ĵurnalistoj, ni povas iomete kompreni), ni ne povas fari pli. Nur vi kaj viaj kunlaborantoj povas ŝanĝi tiun ĉi mankhavan staton per vigla interveno ĉe la redakcioj aŭ la ĉefagentejo gazetara en via lando.

Ni esperas, ke estos eble por la 25a Universala Kongreso en Kolonjo atingi kiel eble plej efikan diskonigon de novaĵoj en via lando.

Ni dankus vin, se vi sciigus en via proksima numero la faktojn pri nia arango en Parizo.

Kun plej samideanaj salutoj, Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado, Robt. Kreuz, Direktoro.

### PRI MANĈURIO.

**Elĉerpo el artikolo de Lord Lytton en The Spectator, London.**

". . . La gravega demando ne estas, ĉu Japanujo ĉu Ĥinujo gvidregu la estontan vivon de Manĉurio, sed—ĉu estas konservota aŭ detruota la principo de kolektiva respondeco pri la konservado de l' paco kaj justo inter la nacioj . . .

"Oni ripetade informis nian komisionon ke Manĉurio estas la 'savŝnuro' de Japanujo; ke Japanujo jam devis batali du militojn sur manĉuria tero; ke ĝi oferis 200,000 vivojn kaj bilion jenojn por akiri la rajtojn kaj interesojn kiujn ĝi nun tie pretendas; ke tiuj historiaj asociacioj estas neforviŝeble stampitaj en la koron de ĉiu japano, kaj ke Japanujo estas tre sentema kontraŭ kiu ajn ekstera interveno en aferoj pri kiuj ĝi rigardas sin la sola koncernato.

"Nia komisiono akceptis ĉi ĉion kaj lauorde enverkis ĝin en sian raporton, sed ni sentis ke estas nia devo atentigi al la japana fremdafera ministro la fakton ke ekzistas ankoraŭ afero por kio aliaj nacioj faris eĉ pli grandajn oferojn ol Japanujo, afero kiun tiuj nacioj rigardas kiel samgrade valorega, kaj kiun ili defendos egale firme, nome la organizo de kolektiva respondeco pri la konservado de la mondpaco. Por la popoloj kiuj plej suferis en la Granda Milito la Ligo de Nacioj estas la 'savŝnuro' de la moderna civilizacio."

**"La Dia Regno":** Mi havas specimenojn de ĉi tiu evangelikristana gazeteto por disdoni, kontraŭ unupenca p. marko. Red.

### AUSTRALIAN LABOR ESPERANTO ASSOCIATION.

All esperantists and others interested are invited to attend a meeting at Temperance Hall, Russell street, on Tuesday, 28th February, at 8 p.m., to assist in formation of A.L.E.A.. Further particulars may be obtained from Mr. E. P. Owen, 14 Anzac street, S.E.9.

## Atentu Sinjorinoj!

A. Kio precize estas la ĉarmo, Manjo?

M. Ho, estas speco de florado en la virino. Se oni ĝin havas, ne necesas havi ion ajn alian, kaj se oni ne ĝin havas ne multe signifas kion ajn alian oni havas. Kelkaj virinoj, la malmultaj, havas ĉarmon al ĉiu; kaj la plejparte havas ĉarmon al unu; sed kelkaj havas ĉarmon al neniu.

**El "Kion scias ĉiu virino" de J. M. Barrie.**

La sentado de unu virino povas havi tre subtilan influon al la humoro de alia. La plejmulto de virinoj komprenas unu la alian instinkte, eble per ia antikva sekslingvo kiu ekzistis longe antaŭ ol sonoj fariĝis vortoj.

El la libro, "La Fiero de Eve" de Warwick Deeping.

**Rulaĵoj por la festeto. El Argentino.**

Buteri kelkajn maldikajn trancaĵojn de bruna pano, kaj ŝmiru ilin per pasto farita el kokida pureo al kiu estis aldonitaj kaporoj kaj anĉova pasto en taŭga proporcio. Premplatigu la preparitajn tranĉaĵojn, netigu la randojn, kaj buteri la supraĵon. Aspergu duonon de ili per ete pecigita petroselo, kaj la alian duonon per omara koralo, kaj metu ilin alterne sur plado kaj servu.

Esperanta edziĝo soleniĝis en Budapest antaŭ nelonge, kiam la pastro alparolis al la gefianĉoj en la internacia lingvo. Hungara fraŭlino konatiĝis kun belga fabrikisto per korespondado en Esperanto, kaj, pli poste, ili renkontis unu la alian ĉe Esperanta Kongreso en Parizo. Tuj la Belgo proponis edzecon al la Hungarino, sed pro tio, ke nek li nek ŝi komprenis la lingvon de la alia, eĉ la edziĝa soleno devis esti efektivigita en la komuna lingvo.

(El la "Woman's Budget.")

La perfekte honesta virino: virino kiu neniam flatas, kiu neniam estras, neniam allogas, kaŝas nenion, neniam uzas la okulojn, kiu neniam konjektas pri la efekto kiun ŝi kaŭzas, kiu neniam konscias pri neparolita admiro, kia monstro, mi diras, estus tia virino!
(El la Woman's Mirror por Novembro.)

# N.Z.E.A. Section. 11th Official Bulletin

**Fourth N.Z. Esperanto Congress. Masterton, 27-29 December, 1932.**

Mr. G. R. Sykes, M.P., Honorary President of the Masterton Esperanto Club, welcomed congress delegates and visitors to Masterton at the civic reception and official opening of the fourth N.Z. Esperanto congress, held under the auspices of the New Zealand Esperanto Association at the Y.M.C.A., Masterton, 27-29 December. Visitors found at beautiful Masterton an active Esperanto club with a large band of enthusiastic members.

**Members and Supporters.**

Attending:—Madame Carle, Mr. and Mrs. A. Dewar, Mr. A. M. H. Dewar, Misses E. and N. Elliot, *Mr. H. F. Franks, Mrs. Hubbal, Miss A. Ibbetson, Mr. B. and Miss L. Johns, Mr. and *Mrs. J. McNab, Mr. L. Rutherford, Mr. A. D. Sheppard, Mrs. and *Miss Stidolph, Misses A. and D. Winhall (Masterton), *Mr. M. F. Pavlinovich (Tinui), *Mr. H. E. Facer (Palmerston North), Miss G. Carty, Miss Duguid, Mr. and Mrs. L. E. Dust, Mr. W. L. Edmanson, Mr. E. C. Jack, *Mr. Wm. H. King, Mrs. R. McGuigan, Miss C. Smythson (Wellington), Miss L. Corkill (Christchurch). Non-attending:—Mr. N. D. Franks (Napier), Mr. C. J. Adcock (Drury), Mr. S. Andrew (Feilding), *Mrs. A. Chapman-Taylor (New Plymouth), Mr. L. A. Efford (Christchurch), *Mr. J. A. Hodges (Okoroire), *Mr. G. Gordon (Ch'ch.), Mr. J. Mader (Helena Bay), *Mr. T. E. McMillan (Matamata), *Mr. F. W. Luhning, *Mrs. E. M. Watkin, *Mr. C. W. Brandon, Mrs. E. Philpott (Auckland), *Mrs. F. Lusher (Hastings), Mr. S. M. Ujdur (Henderson), *Mr. A. C. Ward (Wimbledon), Mrs. E. H. Wall (Albany), *Mr. M. J. Ravelich (Khandallah). (The 'star' denotes member-donor, to whom thanks are given.—W.H.K.).

**Civic Reception—Formal Opening.**

Congress assembled at 2 p.m. on 27 December for the civic reception and formal opening. There was a good attendance. Mr. A. Dewar, president of Masterton Club, introduced the NZEA officials to Mr. Sykes, who said he felt convinced the time would come when authorities, including those in N.Z., would heed the claims of Esperantists that Esperanto be officially recognised.

Mr. Dust, President of the N.Z.E.A., then declared congress officially open; and asked that a vote of thanks be tendered Mr. Sykes by acclamation. The session was thereafter conducted in Esperanto and English. Mrs. Fieldhouse splendidly rendered "La Espero," after which the assemblage paid respect to the memory of the late Rev. J. H. Hawkes, a Dominion pioneer Esperantist whose death occurred during the year.

A large number of letters and telegrams from absentees were read and congress then adjourned for the taking of the official photograph.

Resuming, club delegates (Miss L. Corkill, Christchurch, Miss C. Smythson, Wellington, and Mr. H. F. Franks, Masterton) delivered reports regarding the activities of their respective clubs.

**Public Pronouncement.**

The following pronouncement was then placed before congress by the NZEA, and unanimously adopted:—

